

Kompleta Ba(r)lasto(no)

La usona sindromo prosperas

Ni komencu nian ĉi-numeran editorialon per jena amuza anekdoto: En sia malferma artikolo en la junia eldono de la revuo *Esperanto* (UEA), la aŭtoroj Corsetti/Dasgupta starigis atentindan kaj samtempe kuriozan hipotezon, nome: „Ke la ĉefa problemo de UEA en la pasintaj 60 jaroj estis la malforteco de la usona lando asocio. Ĉar se hodiaŭ reaktuala alvoko de Esperanto estus veninta el la usona kontraŭkulturo, ni estus nun en bona pozicio, kiel... la rokmuzika industrio.“

Ĉu temas pri ŝerco ? Se temas pri serioza aserto, ni ĝin povus konsideri kiel vere originalan, kvankam ĝi enhavas unu ĉefan pensaron: Jes sub la klarigitaj premisoj ni estus kun Esperanto eble en simila pozicio kiel la usona rokmuziko, *se Esperanto ne estus Esperanto, sed la angla*, kiel necesus honeste aldoni en la artikolo de Corsetti/Dasgupta.

En intervjuo kun „Aleksander Stump“, nova ministro pri eksterlandaj aferoj de la „Esperanta Respubliko“¹, estis efektive konfirmite, ke Usono estas la ĉefa obstaklo, por ke Esperanto venku en la mondo. La „ministro“ diris al la demando de la reportero: „La ĉefa obstaklo certe estas Usono. La usonaj politikistoj en la internaciaj kunvenoj jam rimarkis, ke la eŭropanoj ĉiam interparolas en Esperanto. Ilin tre tedas, ke ili ne komprenas, kaj ili nun suspektas, ke ni disvolvas konspiracion kontraŭ Usono. La situacio nun pli kaj pli ofte proksimiĝas al deklaro pri milito inter Usono ja EU. La situacion ofte savis tio, ke la usonaj kaj eŭropaj politikistoj en vesperoj ofte amuziĝis per spekti glacihokean eventon, kie ludis Kanado kontraŭ Usono aŭ kontraŭ iu eŭropa lando. La kanada glacihokea teamo ja estas nia komuna malamiko, tio kunigas kaj amikigas nin.“²

B-komitatanoj

Ni revenu al la pli seriozaj temoj. Kiel oni povis antaŭvidi, novaj komitatanoj B fariĝis tiuj kandidatoj, kies nomoj estas plej popularaj en la Esperanto-movado, dum la ceteraj ne atingis sufiĉajn voĉojn por esti elektitaj. La 1-an de junio okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses komitatanoj B por la periodo 2010-2013. Balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis *Mark Fettes*. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis *Probal Dasgupta* (973), *Barbara Pietrzak* (876), *Amri Wandel* (820), *José Antonio Vergara* (816) kaj *Wu Guojiang* (732). Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen

¹ <http://esperantarespubliko.blogspot.com>

² <http://www.esperanto.fi/esperantolehti/Stump.htm>

(613), Marija Belošević (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).³

Interesa estas jena cirkonstanco: En la jaro 2009 Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM). En la aktualaj elektoj balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550. Do dekomence ekskluditaj el la baloto estis 912 membroj, ĉar ili ne pagis la kotizon. Resume: 4163 individuaj membroj NE partoprenis la baloton. La redakcio de *Spiegulo* ne intencas detale komenti tiujn rezultojn kaj farojn. Ni nur bedaŭras, ke sep tamen signifaj kandidatoj ne estis elektitaj en la komitaton, kie ili estus bezonataj, kaj volus aldoni jenan observon: La konduto de la voĉdonintoj estas mirinda. Krom la ĉino ĉiuj aliaj elektitaj B-komitatanoj estis samtempe kandidatigitaj por la estraro (Fettes retiris sian kandidatigon kaj Vergara estis faligita), dum neniuj el la neelektitaj kandidatoj eksplicite havis la ambicion fariĝi estrarano. Alivorte: La elektitaj B-kandidatoj forkaptis la mandatojn por la B-komitataneco, da kiuj ekzistas nuntempe ses, dum la aliaj ses kandidatoj, kiuj sincere disponigis sin por tiu ofico (legu la intervjuojn kun ili en *Libera Folio*), ne povis fariĝi komitatano, pro la ekzisto de stulta regularo kaj groteska formala burokratio. Eblas do paroli pri farso. Necesas ŝanĝi tiun regularon ! Kiun sencon tiu okazinta proceduro pri elekto de B-komitatanoj havas ? Ŝajnas ke ĝi servas al iuj spekulaciaj ludoj por iuj eternaj funkciuloj, kiuj nepre volas esti reelektitaj, dum ĝi nur seniluziigas kuraĝajn samideanojn, kiuj eble perdas sian entuziasmon, se oni ne elektas ilin al la de ili dezirataj oficoj. Eĉ unu komento flanke de la komitato aŭ de UEA ne estis farita pri la rezulto de tiuj elektoj. Ĉar nia movado dependas de ĉiuj kapablaj fortoj, en tiu kazo la superflua konkurenco por postenoj estu forigita, kaj prefere ĉiuj sin disponiĝintaj kandidatoj estu akceptitaj kiel novaj komitatanoj.

Reprezente por multaj, iu pola samideano komentis la elektojn de la B-komitatanoj jene: „Pardonu karaj, sed kiel simpla esperantisto mi tute ne komprenas la elektan teatraĵon. Mi kontribuis por vigligi la diskutadon, ĉar mi opinis, kiel multaj aliaj, ke renovigado estas nepre bezonata. Mi ĝojis, ke venis novaj ideoj de pli junaj homoj, kvankam ankaŭ ne tro revoluciaj, tamen kuraĝaj por iom ŝanĝi la elektitan sakvojon. Mi ĝojis kaj esperis. Nun mi tute ne komprenas por kio estas tiu farso farata, por kio utilas voĉdoni, se jam estas klare? Por kia diablo bezonataj estas ABC kaj eble Z-klasoj ? Ĉu ne simple kaj klare estus voĉdoni kaj unuaj plej bonaj elektas demokratie prezidanton? Kial tiel kompliki, se povus esti pli simple? (...) Mi aliĝis ĉi-jare al UEA kaj se mi vere ne vidos emon ŝanĝi arkaikan kapuson, estis ankaŭ mia lasta jaro de la aneco kaj provo konvinki aliajn.“ La sama kritikanto opinias ankaŭ, ke en la nuntempo oni povas gvidi konferencojn pere de Skajpo, por kio neniuj elspezoj estas bezonataj. Kaj li komencas dubi pri tiuj funkciuloj: „Ĉu vi vere volas helpi al la Esperanto-ideo, aŭ ĉu nur temas pri oportunaj postenoj ? Klasbatalo ? Hegemonio ?“⁴

³ Ĉio pri tio vd. <http://www.liberafolio.org/2010/mark-fettes-sur-unua-loko-en-la-elektoj-de-uea>

⁴ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274617253>

Nova malnova estraro

Lige kun tio ni ankaŭ ne miras pri la konfirmo de la ,nova' estraro en Havano, kiu tamen estis modifita je tri novaj figuroj. *Spegulo* rekomendis ne reelekti tiun estraron, sed kompreneble la voĉoj esprimitaj tra tiu revuo ne estas aŭdataj. Nu, finfine tiu estraro ne estas la problemo de *Spegulo*, sed de UEA. Ni ankaŭ ne arogas al ni havi la rajton esti konsilantoj de UEA. Ni konscias, ke estas malfacile kompili novan estraron kaj ke oni devas preni tion kio sin proponas. Kun Dasgupta tamen okazis malgranda perturbo. Dum la baloto pri la B-komitatanoj *Libera Folio* ricevis respondon de Probal Dasgupta al demando pri tio, ĉu efektive la voĉdonado de la individuaj membroj ne povos influi la konsiston de la estraro: Dasgupta respondis jene: „Jes, mi restas ĉe mia sindevontigo farita kaj raportita: mia kandidateco kiel prezidanto dependas de elekto kiel komitatano B. Se mi ne elektoĝos kiel komitatano B, mia kandidateco forfalos, kaj la elekta komisiono estos devigata rapide refari siajn tabelojn.“ La fakto, ke li tamen kandidatas kiel C-komitatano, laŭ li devas esti sekvo de ia miskompreno, ĉar li mem nenion faris tiudirekte, li diras: „Se okazis miskompreno, ĝi nepre fontis el jeno. Foje okazas, ke iu sendas al mi retmesaĝon kaj diras, ‚Se vi ne respondos en la venontaj x tagoj (ekz 10 tagoj), ni supozos, ke vi respondas jese.‘ Pro vojaĝado (ĉefe enlanda) kaj aliaj kialoj (ekzemple troa entuziasmo fare de la spamfiltrilo), iujn mesaĝojn mi tute ne vidas, kaj la sendinto do supozas, ke mi respondis jese. Io tia - laŭ mia supozo - eble okazis en tiu ĉi kazo, krom se la elekta komisiono rajtas krei siajn listojn surbaze de propra iniciato kaj sen demandi pri tio la kandidaton.“⁵ Ni ne komentu tiun pravigon.

„Unue“ aldonis en *Libera Folio* pri tiu teatro: „Estas rimarkinde, ke la prezidanto de UEA ne scias, por kiuj postenoj li kandidatas, kaj kiel okazis lia kandidatiĝo.“ Li konsideras la prezidanton konfuzita.⁶

Post tiuj incidentoj ni eĉ dubas pri la honesteco aŭ sincereco de Probal Dasgupta kiel persono rilate siajn oficojn en UEA.

Ne nur pro la fifama kaŭdervelŝo, kiun la prezidanto de UEA postlasas en siaj verkaĵoj, pri la taŭgeco de Dasgupta kiel prezidanto aperis duboj de diversaj flankoj, ankaŭ el Hindio (Barato) mem, kaj la kritiko rezonis sufiĉe draste: Sub la titolo „Baratanoj perdas tempon“, iu „Vijaykumar“ afiŝis la 27an de majo 2010 jenan mesaĝon en *Libera Folio*: „Mi estis feliĉa en 2007 ĉar nia landano fariĝis prezidanto de UEA. Mi divenis ke la prezidanto de UEA kuraĉigos nin progresigi la landan movadon. Bedaŭrinde, mi aŭdis de nia landa prezidanto D-ro Abdul Salam, ke la prezidanto de UEA dum la pasintaj 3 jaroj neniam kontaktis d-ron Salam kaj telefone kaj persone, enketi kian helpon UEA povas doni al FEB fortigi la movadon. Renato (Corsetti) ĉiam memorigas nin havi fortan movadon. Sed en nia lando monda kaj landa prezidantoj ne komunikiĝas. Ĉu UEA povas ŝanĝi tiun situacion? Mi pensas ke Probal havas devon varti la landan movadon ankaŭ. Alie, li perdas moralan kvalifikon esti prezidanto de UEA. Samtempe FEB ankaŭ perdas oran ŝancon!“⁷

⁵ La tutan ĉi-koncernana korespondadon vd. <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274964628>

⁶ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274645464>

⁷ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274964628>

La Elekta Komisiono de UEA, konsistanta el d-ro Renato Corsetti, Lucille (Lusi) Harmon kaj Ileana Schroeder, ŝajnis, ke oni vaste korespondadis kun ĉiuj prezentitaj kandidatoj: „La komisiono post interparolado tre vasta kun ĉiuj koncernatoj taksas, ke ĝia tasko estas certigi teaman kunlaboron en la estraro (kaj ankaŭ en la aliaj teamaj taskoj de la reviziantoj kaj de la financa komisiono). Pro tio kaj kun granda bedaŭro la elekto-propono por la estraro ne akceptas kelkajn el la sugestitaj komitatanoj.“⁸ Kompreneble la veraj kialoj aŭ konsideroj ne estas reflektataj. Ekzemple pri kandidato Vergara oni povis aŭdi, ke li trovis kiel tria ekstereŭropa estrarano, ĉar la financoj de UEA tion ne eltenus kaj ke la vojaĝoj de estrarano el Israelo „kostus“ iom malpli. Vergara mem ŝajne havas alian opinion pri la vera kialo de sia elimino: Iuj simple ne plu volis lin, eble ĉar li estis tro skeptika kaj tro kritika pri certaj aferoj kaj personoj. Plurfoje li esprimis sian opinion en *Libera Folio*, kie lia fervoro pri Esperanto kaj UEA estas dokumentita – sed nek lia fervoro, nek lia flatado kaj afableco, nek lia optimismo helpis al li por esti rekandidatigita. Kiel montris la Estrara Raporto, Vergara ne multon povis fari kiel estrarano pri faka kaj scienca agado, kaj krom raporti pri la agadoj de tiuj eksteraj fakaj organizoj kaj konstati, ke Vikipedio kaj IKU bonfartas, kio estas iom tro arbitra aserto, samtempe li ne hezitis lamenti pri la „malmultnombro de niaj vicoj“ kaj pri la „maltrankviligaj signoj de stagnado ĉe pluraj fakaj asocioj“. Do, Vergara restos al ni konservita almenaŭ kiel komitatano B, kie tiu simpatia sudamerikano ricevos duan ŝancon pruvi sian kapablon kaj batoforton. La posedo de komitatano el Ĉilio estas granda ŝanco por UEA kaj la tuta Esperanto-movado, kiu volas esti internacia.

Malgraŭ nia profunda skeptiko pri tiu konfirmita UEA-estraro, ni deziras al ĝi rezultoplenan laboron, kiu espereble portos Esperanton unu paŝon antaŭen (kaj ne du malantaŭen).

Kuba estraranino

Ankoraŭ kelkaj frazoj pri la alektita estraranino el Kubo. Anstataŭ la ĉiliano José Antonio Vergara, kiu estas sufiĉe ĉagrenita pro tiu aĉa intrigo, UEA do preferis reinstali la kubaninon Maritza Gutiérrez, kiu jam dum 2004-7 estis estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado, fakte sen postlasi videblajn spurojn aŭ atingojn.

Pri la nova estraranino Maritza Gutiérrez González estis en *Libera Folio* jam faritaj kelkaj demandoj flanke de Andreas Künzli:

1. Kubaj civitanoj daŭre povas nur tre malfacile forlasi Kubon kaj havas grandan problemon vojaĝi eksterlanden, kaj politike kaj ekonomie. Kiel estrarano pri Landa Agado oni devus havi liberan eblon viziti ne nur Venezuelon kaj Nikaragvon, sed praktike ĉiujn landojn de la mondo, inkluzive de Usono. Ĉu M. Gutiérrez povas libere vojaĝi kiam ajn al kiu ajn lando de ŝia deziro ?

2. Kian rilaton M. Gutiérrez havas al la kubaj politikaj instancoj kaj servoj ? Ĉu ekzemple ŝi devas raporti pri vojaĝoj kaj kontaktoj al ŝtataj instancoj, menciigi nomojn de personoj, kun kiuj ŝi havis kontakton ktp. ?

3. Kiu pagos (aŭ devos pagi), ekster Kubo, ŝiajn eksterlandajn vojaĝojn kaj ŝiajn restadojn en la cellandoj ?

⁸ <http://www.liberafolio.org/2010/raporto-de-la-elekta-komisiono-de-uea>

4. Kiel M. Gutiérrez intencas plenumi sian korespondadon, kiu ja sendube aŭtomate aperos kaj necesos se oni estas estrarano pri landa agado ? Propraj spertoj montriĝis, ke retkorespondado kun kubanoj en Kubo estas ege malfacila ĝis neebila afero. Praktike respondo oni ne ricevas. Ankaŭ telefonalkvokoj (ĉefe mobila reto) ne funkcias kaj denove neniu respondas. Supozeble M. Gutiérrez havas aliron al la reto kaj al la telefono kaj respondas retmesaĝojn kaj telefonalkvokojn, ankaŭ el eksterlando, sed kiel ŝi rilatas kun la ekstera mondo, se la konektoj en Kubo ŝajne daŭre estas malhelpataj ?

Kompreneble, ĉi tiuj demandoj ne estis responditaj. La havananino preferas per banala komento sed akurate interveni en la komitata retlisto, kie aperas la taŭga momento kaj kie estas bonvene flataĉi kadre de la amikaro, al kiu la kubanino ŝatus aparteni.⁹

La plej magraj kontribuoj en la Estrara Raporto devenis ĝuste de s-ino Gutiérrez, kiam ŝi respondecis pri Landa kaj Regiona Agado, precipe en la jaroj 2006 kaj 2007. Do, oni ne scias, kion ŝi faris en tiu periodo kiel estrarano pri landa kaj regiona agado. Ŝajnas, ke UEA „elektas“ estraranojn ne laŭ la kriterioj de kompetenteco kaj fruktodoneco, sed laŭ iuj aliaj kriterioj, kiuj ne estas klaraj al la publiko kaj ŝajne restas sekretaj. Sed rigardante kio okazas oni povas pli malpli diveni tiujn kriteriojn.

Pri aliaj estraranoj ni jam esprimis nin aliokaze, aliloke. Fakte regas neniam entuziasmo pri tiu nova estraro, pri kiu oni jam nun povas konkludi per la kredo, ke UEA kun tia estraro nenion novan atingos favore al Esperanto ankaŭ en la venontaj jaroj. Alivorte: Per tiu estraro por UEA tiuj jaroj estos perditaj same kiel la antaŭaj, kaj la tuta mono elspezita por ĝi kaj pro ĝi estos ĵetita tra la fenestro de la domo ĉe la strato Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo.

Estrara Raporto 2009-10

La Estrara Raporto publikigita en la junia numero de la revuo *Esperanto* (UEA) entenas sendube multajn interesajn kaj valorajn informojn pri la poresperanta agado en la diversaj landoj, fakoj kaj kampoj de la pasinta jaro. Kiel kutime la raporto estas verkita en iom fanfara-propagandeca tono, dum la kritika reflektado kaj memkritiko grandparte forestas. En tiu raporto estas malfacile distingi la ĝeneralan agadon disde la konkretaj aktivecoj kaj atingoj de la unuopaj estraranoj, kiuj evidente estas tre magraj. Tre interese estas observi kiuj agadoj kaj personoj estas menciitaj kaj kiuj aktivecoj kaj personoj estas prisilentitaj (nu oni ja ne povas menciigi ĉion). Ekzemploj abundas. Cetere la parto de Dasgupta mem en la Estrara Raporto simple mankas. Nia prezidanto eble reiris al Barlastono por instrui Esperanton, por havi ion priraportindan. Lia sola kontribuo en tiu Estrara Raporto estis la atentigo, ke ĉe la Estrara Raporto temas pri raporto, kiu „kovras la antaŭan kalendaran jaron kaj ĝi traktas tiujn agadojn, kiuj estas rekte ligeblaj al la Asocio.“ Li ankaŭ atentigis, ke „tamen, en la praktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de la fakaj asocioj, aŭ eĉ de sendependaj institucioj, kiuj tamen proksime rilatas kun la Asocio“ kaj la finas per la frazo, ke „tiu ĉi raporto do prezentas la bildon de la agado de UEA en la kunteksto de la ĝenerala laboro de la

⁹ Vd. ekzemple: <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5693>.

Esperanto-movado, ĉefe dum la jaro 2009“. Bone, en ordo, sed la riproĉo pro minimalismo Dasgupta ne povas eviti.

La financoj (spezoj) de UEA

Se ni analizas la financojn (spezojn) de UEA, kiuj estas publikigitaj sur la retpaĝoj de uea.org ekde la 22an de junio 2010, ni konstatas perplekse jenon:

La ĉefajn kostojn en UEA kaŭzas la la oficistaro de la Centra oficejo, nome 306'000 eŭroj (buĝeto 2010: 320'000 kaj 2011: 332'000) inkluzive de salajroj, sociaj asekuroj, vetursuplemento, pensiaranĝo. Ni ne komentas tiun ciferon, sed kiel membroj de la asocio starigas la simplan demandon: Ĉu asocio kiel UEA povas al si permesi tiajn personarajn kostojn ? La respondon devus trovi la Komitato de UEA.

Kompare kun tiuj personaraj kostoj la restaj unuopaj kostoj estas kvazaŭ neglektindaj: Centra Oficejo: 24-25'000 eŭroj, Oficeja domo 15-18'000 eŭroj, Revuo *Esperanto* 51'-60'000 (ĉu tro alta kosto por tia speco de revuo ? – el tio la dissendo kostas averaĝe 30'000 eŭrojn, intertempe eblas ricevi ĝin perrete), Jarlibro 15-16'000 eŭroj, *Kontakto* 10-13'000 eŭroj, Vojaĝ- kaj korespondkostoj 16'000 eŭroj, Movada Evoluigo (edukado, informado, eksteraj rilatoj) 9800 eŭroj, aliaj Ĝeneralaj Kostoj 6000 eŭroj, Amortizoj 5400-6300 eŭroj, Afrika oficejo 2000 eŭroj (2009), 5000 eŭroj (2010), 2000 (2011). Sumo de la kostoj: 461'500 (2009), 503'000 (2010), 506'000 (2011). Konklude: Ŝparpotencialo ekzistas laŭ nia pritakso ĉe ĉiuj pozicioj, ekzemple pli malpli 10% por la venontaj jaroj, eĉ se la elspezoj kaj enspezoj estas ekvilibrataj. Tio signifus ŝparon de 50'000 eŭroj ĉe la elspezoj. Ĉu realisme ? Oni devos eviti, ke la kostoj ĉefe por la administrado eksplodos. Ĉe la rimedoj (enspezoj) estas sendiskute, ke necesus altigi la membronombron (aŭ altigi la membrokotizojn), ĉar oni tute evidente vidas, ke nur la kotizoj kaj abonoj (245'000) ne kovras la kostojn por la oficistaro kaj vojaĝkostoj kaj por la produktado de *Esperanto*, *Kontakto*, Jarlibro. Ankaŭ la profito el la vendo de libroj (30-35'000 eŭroj) estas tro magra. Interese estas, ke ĉe la pozicio Servoj/kompensoj oni intencas altigi la enspezon de 21'500 eŭroj (2009) al 70'000 (en 2010 kaj 2010). La kotizprocentaĵo ĉe Kongresoj kaj Turismo en 2009 estis 74'000, en 2010 estos 70'000 kaj en 2011 76'000 eŭroj. Ĉu oni povus ion fari por enspezi pli da mono el turismaj servoj kaj agadoj ? Kio signifas, ke la sumo de la rimedoj (enspezoj) estos 461'500 (2009 kaj pli ol 500'000 en la venontaj jaroj.

Ĉu oni povus peti monon de Unesko, de eksteraj sponsoroj, aliaj kanaloj ?

Nova Strategia Laborplano de UEA

Kaj nun ni iomete komentu la novan Strategian Laborplanon de UEA, akceptitan de la UEA-komitato en Havano.

Unue: La tempolimo 2011-2020 estas tro longa periodo. En la tre rapide ŝanĝiĝanta nuntempo oni ne plu faras tiajn longtempajn strategiajn planojn, kiuj

povas esti eksaj jam post kelkaj jaroj devas esti amenditaj (kiel en la kazo de la antaŭa Strategia Laborplano 2001-2010, kiu estis amenda en 2007).

La ĉefa celo kaj plano de UEA por la venonta jardeko ne devus esti unuavice „Konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“, sed la koncentriĝo pri la informado kaj disvastigo de Esperanto, la altigo de la kvanta kaj kvalita niveloj de la esperantistaro kaj la produktado de kulturaj valoroj en Esperanto (la grava nocio „kulturaj valoroj“ aŭ klarigo pri ĝi mankas en la Strategia Laborplano kaj la konsisto de „la valoro de la neŭtrala lingvo Esperanto“ ne estas priskribita aŭ difinita). Despli ke UEA ne disponas teoriajn kaj praktikajn rimedojn nek kapacitojn nek planon por „konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“. Legante la titolon de la nova Strategia Laborplano oni ricevas la impreson, ke la „Konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“ ricevis prioritaton kaj ne la informado kaj disvastigo de Esperanto.

Entute la kerna celo de UEA ne estas kaj ne devas esti „konservi lingvojn kaj lingvajn komunumojn“, ĉar ĉi tion faras tiuj lingvaj komunumoj mem, eble kun la helpo de specialaj eksteraj organizaĵoj. La Esperanto-movado, kaj precipe UEA kiel organizo ne posedas tiun kernan fakan kompetentecon konscii pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj kaj konservi lingvojn kaj lingvajn komunumojn. Ekzistas neniu ekzemplo en la historio de la Esperanto-movado, kie UEA „helpis plifortigi“ lingvojn kaj lingvajn komunumojn, eĉ ne minoritatajn, sed male ŝajnas, ke ekzistis iuj etnaj minoritatoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto sen ricevi la adekvatan respondon de la Esperanto-movado (ĉi tiu malbone konata temo devus esti esplorata, eble kun la helpo de IKEL). Se Esperanto helpis ponti inter lingvoj kaj etnaj kulturoj, tio estas alia afero, nome temas pri ĝia integra nobla tasko, kiu aŭtomate aperis pro la teoria sinkompreno kaj la praktikaj funkciaj trajtoj de Esperanto, sed tio ne signifas, ke Esperanto „helpis plifortigi“ tiujn lingvojn. Do, temas pri tre diversaj aferoj. Frazoj kiel „esperantistoj delonge kontribuis al la diskonigado de la lingvoj kaj lingvaj komunumoj“ estas ne nur groteska distordo de la realeco, same kiel la imago, ke la Esperanto-movado, aŭ UEA, servu kiel „protektilo por la lingva diverseco kaj por ĉies lingvaj homaj rajtoj“ aŭ „pruvu la pac-potencialon de Esperanto en regionoj kun etna/nacia streĉiteco“ devas esti taksata kiel komplete paranoja supertakso de la propraj kapabloj en certaj Esperanto-medioj, unuavice de UEA mem. La Esperanto-movado defendis ĉiam nur „nian aferon“, sed neniam aliajn lingvojn kaj popolojn. La sola pozitiva punkto en la Strategia Laborplano de Dasgupta estas, ke li elĵetis la „Indiĝenajn Popolojn“, ĉar tiuj vere nenion perdis en la Strategia Laborplano de UEA.

La klopodo „en la etnaj lingvoj konigadi la avangardajn kontribuojn, per kiuj la Esperantaj lingvo, movado kaj kulturo delonge helpadis plifortigi la lingvojn kaj komunumojn, kreante pontajn rilatojn inter diversaj homaj lingvoj kaj kulturoj kaj fortigante etoson de reciproka akceptemo“, ja estas nobla tasko, sed ĉu la averaĝaj esperantistoj komprenos, adoptos kaj efektivigos ĝin en tiu alta ideala senco, restas dubinde. Konante la Esperanto-movadon, oni scias, ke la averaĝaj Esperanto-„klubanoj“ preferas ĉefe kartludi aŭ kvizi, kanti popolkantojn, aŭskulti iujn raportojn kaj prelegojn kaj rigardi lumbildojn, eble legi iujn librojn aŭ fari turismajn

ekskursojn. Esperanto ofte servas nur Kiel preteksto por tiaj kunvenoj, en kiuj oni ofte krokodilas ankaŭ nacilingve post la „oficiala” programo en Esperanto. La ĉi-koncerna taskaro, kiun starigas la Strategia Laborplano, do postulas altan intelektan nivelon, altgradan fakan kompetentecon kaj bonegan konon de la Esperanto-movado, -historio kaj -lingvo, pri kiuj la averaĝaj Esperanto-klubano malofte aŭ eĉ ne disponas kaj ofte ankaŭ ne interesiĝas. Do, la Strategia Laborplano grandparte ne taŭgas por tiuj „plebaj” publikoj, kiujn intelektuloj kaj verkantoj de Strategiaj Laborplanoj ĝenerale ĉiukaze evitas. Ekzemple oni nepre evitu, ke lokaj kluboj sendu „leĝopropojn” al ministroj de siaj landoj, ĉar plej ofte temas pri diletanta agado de amatoroj, kiuj nenion komprenas pri politika kaj leĝodona proceduro, sed kiuj havas la fiksan ideon enkonduki desupre Esperanton.

Antaŭvidi, ke Unesko „espereble” lanĉos la Jardekon de Lingvoj, estas spekulacia risko. Kio okazos, se Unesko ne lanĉos ĝin ? En tiu kazo la Strategia Laborplano de UEA komplete perdos sian aktualecon, almenaŭ rilate tiun temon.

Estas dubinde, ĉu oni devas apartigi „la centran UEA” disde la „pli larĝa” UEA. Tia dispartigo povas esti eĉ danĝera, ĉar ĝi povas krei elitecon ene de UEA, kiel ĝi fakte jam nun ekzistas ĉirkaŭ la estraro de UEA, kiu povas subite perdi la rilaton kun la „pli larĝa UEA”, kiu povas senti sin neglektita kaj trompita de tiu elito (kiel tio parte jam nun reale okazas).

Kial oni konstante emfazas, ke la aferoj estu „centraj” ? En certaj landoj kun federisma strukturo la homoj pensas malcentre kaj do havas nenian komprenon pri „centra UEA” kaj simile. Eĉ Hindio estas federacia ŝtato (ĉu nur surpapere?). Cetere en Eŭropo la popoloj fariĝas pli kaj pli alergijaj kontraŭ la rigida brusela centrismo.

La Strategia Laborplano estas karakterizita de stranga lingvaĵo kaj bizaraj esprimformoj, kiuj ne estas kutimaj en la Esperanto-lingvostilo – kelkaj ekzemploj: „Ebentavoloj”, „fleksebliĝo”, „unuaviciĝi kaj duaviciĝi la formalizaĵojn”, „reliefigoj”, „landerprovinc-nivela”, „centra bazdokumento”, „esperantista kunkonstruado”. Krom tio, oni ne kutimas skribi en UEA Landa Asocio, sed Landaj Asocioj. Do jam lingve la tuta Laborplano postlasas strangan impreson.

Sensencaj balastfrazoj kiel „Ni proponas emfazi la laborojn mem kaj duaviciĝi la formalizaĵojn, kies celo estas ebligi la pluiron de la laboroj” restis lasitaj en la dokumento, kvankam la verkintoj de la teksto ricevis la rekomendon de ekstere forstreki tiajn frazojn kaj trovi pli taŭgan formon. La kulmino de idiotisma skribmaniero estas tutaj alineoj kiel ekzemple tiuj ĉi: „La bazaj principoj de la organiza fleksebliĝo estas: eksplicite kaj kolektive difini celojn sur ĉiu nivelo de la agado; identigi la metodojn, rimedojn kaj ekstermovadajn partnerojn kaj la financajn rimedojn, per kiuj labori al tiuj celoj; plani kaj plenumi la laboron (PD konsentas aldoni: per tiuj metodoj kaj rimedoj kaj kun tiuj partneroj, kaj) surbaze de la kapabloj kaj limoj de tiuj individuoj, kiuj agas.”

Aŭ: „Tiuj A-komitatanoj, kiuj reprezentas la landajn asociojn ĉe UEA, duonformale organizu sin en specifa listo kiel apartan grupon ‘landa asociaro’. Ĝi konsistu el tiuj A-komitatanoj plus sisteme elektataj reprezentantoj por la regionaj komisionoj kaj por enlandaj movadoj sen A-komitatano.“ Ĉu iu komprenas pri kio temas ?

Aŭ: “...hibride inter la membreco kaj la simpla klienteco kaj mesaĝante tiamaniere ke tiuj ‘klientaj membroj’ sentu apartenon.“ Kion signifas „hibride“ kaj kion signifas „klientaj membroj“ ?

Kial fondi novajn strukturojn kiel „Esperanta Stud-Fondaĵo“ aŭ „Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo“, se ekzistas sufiĉe multaj malnovaj strukturoj, kiuj estas neglektataj kaj preskaŭ ne plu funkcias pro manko de gvido, ideoj, rimedoj, resursoj, kunlaboro, membroj ? Unue oni funkciigu kaj refreŝigu unuopajn ekzistantajn komisionojn de UEA antaŭ ol fondi novajn fikciajn organizaĵojn prezidatajn de la eterne samaj fanfaronuloj.

Mencii Eroŝenkon signifas esti ne nur blinda pri la realecoj en la Esperanto-movado, sed nostalgii pri praktikoj jam delonge eksaj. Por blinduloj, kiuj estas lasitaj de la Esperanto-movado al sia propra sorto, UEA provizas neniujn servojn. Prefere oni ‘reliefigu’ la ideojn de Hodler, Privat, Lapenna, Tonkin kaj aliaj gravaj strategoj de la Esperanto-movado, referencu al iliaj teoriaj verkoj kaj praktike eltiru la konsekvencojn el iliaj konsideroj. La Strategia Laborplano povus baziĝi pli klare ekzemple sur la konsideroj de la verko „Lingvo kaj popolo“ de Humphrey Tonkin. Li ja ne celis vane verki ĝin por la propra plezuro, sed por ke la esperantistoj pripensu liajn konsiderojn kaj eventuale eltiru el ili iujn konsekvencojn.

Lige kun tio - eĉ unu aludo pri necesaj reformoj en Universala Esperanto-Asocio ne troviĝas en la nova Strategia Laborplano. Kaj multaj gravaj konsideroj de plej diversaj komitatanoj kaj (neelektitaj kandidatoj), kiuj estis prezentitaj en *Libera Folio*, estas simple ne reflektataj, sed krude ignorataj.

Komplete forgesitaj estis en la Strategia Laborplano la aparta emfazo de la graveco de la esperantologia kaj interlingvistika agado, kiel tio okazis en la antaŭa Strategia Laborplano, se oni jam „eksplicite“ mencias diversajn sferojn de la planlingva kaj esperantista agado. Tio estas stranga, ĉar Dasgupta laŭdire mem estas esperantologo aŭ interlingvisto, redaktoro de LPLP ktp. Ĉi tiuj nocioj nepre devus ekzisti en tia grava kaj vojmontra dokumento, same kiel ‘aktivula trejnado’, ‘Landa agado’ kaj ‘Eksteraj rilatoj’, de jardekoj la ‘sanktaj bovinoj’ de UEA. He, Dasgupta – ĉu vi ne aŭdis: sanktaj bovinoj ? Ĉu neniuj rimarkis tiujn mankojn kaj forgesojn ?

Strange, ke mankas ankaŭ mencio pri la „gravega“ Praga Manifesto (1996), tiu ĝis nun plej „fekunda idearo“ (Vergara) de UEA, kiu devintus konduki la Esperanto-movadon en la 21an jarcenton, sed pri kiu apenaŭ plu iu parolas aŭ interesiĝas. Ankoraŭ en la antaŭa Strategia Plano ĝi estis ĝia integra parto, ĝiaj principoj proklamitaj kiel validaj. Ĉu ĝia nemencio en la nova Strategia Laborplano

estas intenco aŭ forgeso, kaj ĉu per tio la Praga Manifesto, kiun Dasgupta antaŭ nelonge sur la paĝoj de *Spegulo* kaj aliloke ankoraŭ defendis per ĉiuj manoj kaj piedoj, estis de li mem definitive entombigita ?

Lingvaj Homaj Rajtoj

Ho kia bombasta temo ! Kian konkretan „koncepton pri „Lingvaj Homaj Rajtoj“ oni volas disvastigi ? Ĉu tiuj „Lingvaj Homaj Rajtoj“ estas ie difinitaj, ekzemple el esperantista vidpunkto ? Ŝajnas, ke parto de la esperantistaro ne komprenas pri kio temas (kiel montris enketo, pri kiu ni raportas en aparta rubriko post ĉi tiu editorialo). Anstataŭ proklami la neceson disvastigi ian abstraktan, aŭ nebulan „koncepton pri Lingvaj Homaj Rajtoj“, oni prefere klarigu tiujn Lingvajn Homajn Rajtojn kaj fondu laborgrupon por rediskuti la temon. Unu el la referencoj povus esti la artikolo „Homaj rajtoj, lingvaj homaj rajtoj kaj Esperanto“, kiun Renato Corsetti publikigis en la festlibro Blanke (2001), kiun oni cetere trovas en interreto. Sed ĉu sufiĉas la frazo de Zamenhof „...la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado“, kiun Corsetti trovis en „Esenco kaj estonteco“, por pravigi la prioritatan agadon pri lingvaj homaj rajtoj en UEA ? Tre dubinde. Estas facile (kaj danĝere) arbitre ĉerpi iujn ajn frazojn el la Zamenhofa verkaro (kunteksto) por laŭplaĉe interpreti kaj (mis)uzi ilin por la pravigo de propraj dubindaj asertoj. La veraj humanismaj intencoj de Zamenhof kaŝiĝas en lia hilelismo/homaranismo, sed tion oni kompreneble ne mencias en tiaj artikoloj, ĉu intence aŭ pro manko de scio ne estas klare.¹⁰

¹⁰ En la Hilelismo/Homaranismo de 1906 Zamenhof skribis pri la lingvaj rajtoj jenon: 2. „Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj... Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo pro tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia ligvo aŭ religio ol mi, mi rigardas Kiel barbarecon.“; 3. Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas; la intermiksado de la intereso de lando kun la intereso de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas Kiel restaĵon de la tempoj barbaraj...“; 4. Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj nedisputeblan rajton, paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas..., sed en komuniĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan. ... Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon.“ 7. Mi konscias, ke en tiuj landoj, ke li loĝantaro estas plimalpli unugenta, ĝi longan tempon ne komprenos la maljustecon de regado de unu lingvo aŭ sreligio super la aliaj kaj ĝi per ĉiuj fortoj batalados kontraŭ le egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj, kaj la defendantojn de tiu ĉi egalrajtigo ĝi persekutados kaj superĵetados per koto. Sed mi neniam konfuziĝos per tiu ĉi persekutado, memorante, ke mi batalas pro absoluta vero kaj justeco, ke nenia popolo povas scii, kio fariĝos kun ĝi morgaŭ, ke la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj forigos la kaŭzon de ĉiuj militoj kaj malpacoj inter la popoloj, ke ĉia ago kontraŭ la devizo „la regno por la regnantoj“ kaj ĉia perfortaĵo de unuj regnantoj kontraŭ aliaj restas ĉiam perfortaĵo, eĉ se ĝi estas farata de grandega plimulto kontraŭ malgrandega malplimulto, kaj ke fortika feliĉo de la homaro estas ebla nur tiam, kiam por ĉiuj popoloj kaj landoj ekzistos nur tuteco egala kaj asboluta, dependeanta nek de loko, nek de tempo, nek de forto, kaj kiam en ĉiu regno ekzistos nur homoj kaj regnantoj kaj ne gentoj.“ 8. „Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; ...“ 9. „Mia lingvo mi nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone scias kaj plej volonte parolas, sed al la nomo de tiu ĉi lingvo mi devas ĉiam aldoni la vorton „hilelista“, por montri, ke mian lingvon mi

Denove: La prioritata tasko de la Esperanto-movado kaj de UEA estas altigi la kvantan kaj kvalitan nivelon de la esperantistoj kaj ne promocii „Lingvaj Homaj Rajtoj“, despli ke UEA evidente ne disponas pri la taŭga teoria argumentaro kaj la praktika rimedaro. Bedaŭrinde, UEA nur fantazias pri tiuj lingvaj homaj rajtoj, sed neniu vere serioze okupiĝas pri tiu temo, verŝajne ĉar ĝi estas tro politikeca. Se la Esperanto-movado volus okupiĝi pri lingvaj homaj rajtoj, tiukaze ĝi devus alpreni politikajn vidpunktojn por aŭ kontraŭ sintenoj, ekzemple de registaroj, kiuj subpremas etnajn malplimultojn; alivorte: kiu diras A, tiu devas diri ankaŭ B. Sed kiel konate, la Esperanto-movado, kaj precipe UEA, tre malvolonte alprenas politikajn vidpunktojn, ja ĝi timas ilin same kiel la diablo timas la konsekritan akvon; kaj se ĝi alprenas ilin, tiam sendube kunlabore kun registaroj, kiuj pro la Universala Kongresa turisme profitas. Dum ekzemploj abundas, kie UEA malgraŭ politikaj duboj ne rezignis kongresi (Kolonjo 1933, komunismaj ŝtatoj, Kubo, Ĉinio, Vjetnamio, ktp.), eĉ male, serĉis la favoron de la oficialaj registaroj, ne ekzistas ekzemploj, kie UEA apogis (minacatajn) etnajn nacimalplimultojn (judojn, ciganojn, tibetojn, ruandanojn, bosnianojn, ktp.).¹¹ Escepto eble estas IKEL, faka asocio de UEA, kie engaĝitaj individuoj atentigis pri malrespektoj de la rajtoj de minacataj etnaj minoritatoj. Por UEA tio ŝajne sufiĉis. Do, la Esperanto-movado povas pretendi neniajn meritojn pri subteno favore al „homaj rajtoj“ koncerne etnajn minoritatojn aŭ helpo al ili en kazo de ekzista minaco. Daŭre ekzistas granda aro de etnaj minoritatoj sur ĉiuj kontinentoj, kiuj estas subpremataj aŭ diskriminaciaj de aliaj etnaj grupoj aŭ de registaroj – ŝajnas, ke UEA tio lasas indiferenta. Cetere, en la menciita artikolo Corsetti mem ne kapablis klarigi kio estas aŭ estu lingvaj homaj rajtoj, sed li preferas resti ĝenerala kaj polemiki kontraŭ Usono, kiu laŭ li mem ne respektas la homajn rajtojn, kvankam ĝi daŭre fanfaronas pri ili. Laŭ Corsetti la lingvaj homaj rajtoj estas „ankoraŭ naskota bebo“. Ĉu ĝi do intertempe naskiĝis oni ne scias. Nu, cetere, ekzistas la fama *Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj* (Barcelono 1996).¹² En interreto oni trovas relative malmulton pri lingvaj homaj rajtoj¹³ – ŝajne

ne rigardas Kiel mian idolon kaj ke mia idealo estas lingvo neŭtrale-homa. ... En mia familia vivo mi povas uzadi kiun lingvon mi volas, sed mi devas ĝin nomi ne mia nacia, sed nur mia lingvo familia. Kiam oni demandas min pri mia lingvo nacia, mi devas respondi: „La ekzistadon de lingvoj naciaj mi ne konfesas, ĉar ĉiu nacio nuntempa parolas per multaj lingvoj; sed mia lingvo genta estas jena (nome tiu lingvo aŭ dialekto, kiun en mia patrujo parolas la plimulto de mia gento, se eĉ mi mem tute ne posedus tiun ĉi lingvon).“ Jen ĉi tiujn frazojn de Zamenhof necesas citi kaj analizi parolante pri lingvaj homaj rajtoj en la senco de Zamenhof. Sed ĉar la esperantistoj ĝenerale ignoras la hilelismen/homaranismon, ili nek bone komprenas la lingvaj homajn rajtojn en la senco de Zamenhof kaj do komencas fantazii kaj skribi nebulaĵojn pri ĉi tiu temo (kiel Corsetti, Dasgupta kaj aliaj).

¹¹ Al la demando „Ĉu vi disponas la scion, ke en la pasinteco ekzistis iuj etnaj nacimalplimultoj, kiuj estis interesataj pri Esperanto kaj pri ties pera/helpa funkcio favore al la subteno kaj diskonigo de tiuj koncernaj nacimalplimultoj?“, Daniele Vitali, prezidanto de IKEL, respondis (25-06-2010), ke „mia opinio, almenaŭ inter la esperantistoj, la plej etnokonsciaj estas katalunoj, eŭskoj kaj flandroj. Se ni projekcias inversen, ni povus konsideri, ke inter tiuj etnoj la homoj esperantistiĝas pro naciaj kaŭzoj. Tamen mi ne scias pri popoloj, kiuj en socie konsiderinda amaso esperantistiĝis, entute kaj pro etnaj kialoj ankaŭ.“

¹² Vd. la retejon <http://www.linguistic-declaration.org>. Esperanta-traduko sur <http://www.esperantio.net/index.php?id=19>. UEA ne subskribis ĝin, sed Esperanta PEN Centro.

¹³ En Vikipedio oni trovas nur magran tekston sur http://eo.wikipedia.org/wiki/Lingvaj_rajtoj. Iom pli malmagra estas la anglalingva versio. En la Esperanta versio necesus ĝuste aldoni la supre cititajn frazojn

temas pri la kroma ŝatokupo de iuj efemeraj akademiecaj intelektuloj-lingvistoj¹⁴ kaj de iuj neregistaraj organizoj, kiuj malkovris tiun niĉon, kvankam ĉe ili oni povas malkovri nenian seriozan intencon kaj kapablon helpi al tiuj minacataj nacimalplimultoj.

Ni ne estas kontraŭ „Lingvaj Homaj Rajtoj“ kaj estus eĉ elektintaj tiun titolon kiel moton por la nova Strategia Laborplano.

Anstataŭ daŭre tiom esperege kaj flateme alkroĉiĝi al Unesko, kiu eĉ unu eŭron dum la jaro ne sendas en la kason de UEA, kiel la Centra Oficeno konfirmis nian demandon (junio 2010), prefere UEA serĉu kaj konkrete intensigu la rilatojn kun aliaj unuopaj neregistaraj organizaĵoj en kaj ekster la UN-sistemo, kiuj defendas similajn homrajtajn celojn aŭ kiuj eĉ simpatias kun la Esperanto-movado. Eĉ unu konkreta ekzemplo de tia organizaĵo ne estas menciita en la Strategia Laborplano, kiu povus esti konsiderata por tia kunlaboro. Fakte ekde la komenco UEA neniam kapablis reale kunlabori kun aliaj gravaj neregistaraj organizoj kaj do ankaŭ ne devas miri, se ĝi restas tute sola.

Pri Vikipedio: Ĉu Dasgupta ne sciis, ke seriozaj sciencistoj ne publikigas siajn verkaĵojn en Vikipedio, kies „altprofileco“, precipe en la kazo de la Esperanto-versio, cetere povas esti pridubata. Sekve, en multaj seriozaj sciencaj eldonaĵoj Vikipedio ne servas Kiel referenco.

La praktikojn de la „retaj membroj“ oni povis observi en la lastaj jaroj: Dum en retforumoj de UEA-membroj kaj UEA-komitato okazas plejparte sensignifaj banalaj kaj hontindaj palavradoj inter kelkaj „amikoj“, kiuj flataĉas unu la aliajn, la solaj pli malpli inteligentaj kontribuaĵoj okazas tra *Libera Folio*, kiu neniel estas ligita kun UEA aŭ aliaj Esperanto-organizo. Estus dezirinde posedi plurajn tiajn retgazetojn, por rompi la monopolon de unusola.

Se UEA kredas, ke pere de la subteno de projektoj kiel lernu.net kaj edukado.net progresigas la Esperanto-movadon, ĝi trankvile tion kredu. Kiel montris la ĝisnunaj observoj, tiuj diletantaj projektoj neniel esence progresigas la Esperanto-movadon, sed nur voras monon, kiu povus esti investita por pli inteligentaj kaj pli signifaj projektoj, ekzemple la eldono de mondfama literaturo, beletra kaj scienca, en Esperanto, por diversaj pilotprojektoj kiel internaciaj konferencoj, en kiuj Esperanto ludas la rolon de traduklingvo (laŭ la modelo de la Nitobe-simpozioj), aŭ por nacilingva tradukado dum Universalaj Kongresoj cele al la allogado de ekstera publiko, k.s.

el la Zamenhofa hilelismo/homaranismo. (Pro malbonaj spertoj kun Vikipedio, la redakcianoj de *Spiegulo* ne partoprenas en ĉi tiu projekto).

¹⁴ Pli malpli la solaj fakuloj, kiuj okupiĝas pri tiu temo, estas Tove Skutnabb-Kangas kaj ŝia edzo Robert Phillipson, kies libron „Linguistic Human Rights: Overcoming Linguistic Discrimination“ oni cetere trovas en Google Books. Esperanto estas kurte menciita sur p. 184, sed evidente ne ludas rolon en la faka diskurso (bone, la libro datiĝas de 1994).

Ekzemple la ĉi-sekva alineo ŝajnas esti tiel baza kaj fundamenta por la laboro de ĉiu organizo, ke oni eĉ ne devus eksplicite mencii ĝin, au se tamen, tiam en alia, pli inteligenta formulo: „La Estraro de UEA funkciigu komisionon pri informado por kunordigi la agadojn sur ĉi tiu kampo. Tiu komisiono mastrumu la produktadon kaj ĝisdatigadon de profesi-nivelaj informmaterialoj pri Esperanto kaj ĝia movado, transdoneblaj (post traduko kaj laŭlanda adapto) al la ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesiĝantoj ktp. Tiu komisiono kreu informmaterialon ne nur pri Esperanto sed ankaŭ specife pri UEA por mondaj celgrupoj (UN, Unesko, aliaj tutmondaj institucioj, internaciaj konferencoj). La komisiono flegu homfortojn kaj mastrumu eventojn, por ke la centra UEA povu en tiaj medioj inde prezenti al la publiko la Esperanto-movadon kaj ĝian kulturen rolon.“ La tuta sermon estas daŭrigita en tiu maniero: „La landaj asocioj kaj regionaj komisionoj interŝanĝu spertojn kaj planojn pri informado al la ekstera publiko en la etnaj lingvoj.“ Brrr. Tiuj frazoj respegulas ne nur la etoson en infanĝardeno, kie la vartistino devas dikti al ĉiu infano, kion li aŭ ŝi devas fari, sed sonas en niaj oreloj ankaŭ kiel la malharmonia metalmuziko de la alplandaj karnavaloj.

Al la esperantistoj, lokaj kluboj kaj Landaj Asocioj oni ne devas baze klarigi, ke ili verku informmaterialon, kontaktu aliajn organizaĵojn aŭ „akcelu la produktadon de lerniloj...kie ili mankas“ aŭ ke „retaj kursoj kaj hejmpaĝoj ...ricevu emfazon“, sed oni klarigu al ili *kiel*, *kiamaniere* ili praktike faru tion. Tiaj alineoj sonas tiel kvazaŭ UEA estis ĵus fondita kaj bezonas nun diskuti pri la starigo de komisionoj, ekzemple pri informado aŭ scienca agado.

La alineo pri ESF ktp., kiu „konsiliĝe kun la uzantoj de lernu.net, ŝtupe lanĉu modere pagatajn aldonajn servojn kaj integri tiajn aranĝojn en la financan strukturon de UEA“ sonas kiel dikto al fremda organizo, kiu estas memstara fondaĵo, sed kiun Dasgupta konsideras kiel la financiston de UEA kaj projektoj ligitaj kun ĝi.

Eble la sola taŭga frazo en la Strategia Laborplano eble estas ĉi tiu: „La celo estas, ke la publiko kapablu pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado al la kulturo de la unuopaj landoj kaj de la mondo.“ Por atingi tion necesas komplete aliaj formoj de agado ol Dasgupta kaj la kunverkintoj de tiun Laborplano povas imagi. Ekzemple nia revuo *Spegulo* klopodas kontribui al tio, ke „la publiko kapablu pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado“. Ŝajnas, ke nur malgranda grupo de klarvidaj esperantistoj, kiuj pli kaj pli komprenas la malfacilan situacion de la Esperanto-movado kaj de UEA, atentis la konsiderojn de *Spegulo*, dum en la Estrara Raporto de UEA kaj Strategia Laborplano de UEA ili estas komplete ignoritaj.

La restan balaston de la nova Strategia Laborplano, verkitan sur neniuj movada analizo ka surbaze de neniuj fakaj kaj sciencaj referencoj, ni eĉ ne deziras komenti, ĉi tiu teksto simple kaŭzas tro da embaraso kaj ĉagreno. En tiu Laborplano komplete mankas trafikaj receptoj kiel oni partoprenu kiel Esperanto-movado en la grandaj internaciaj intelektaj interŝanĝoj, kio estus la plej grava kondiĉo por altigi la ŝancojn de la lingvo Esperanto ludi iun rolon en la internacia vivo. Anstataŭ tio regas skurila

sektemo, pseŭda eliteco kaj paranoja supertakso de la propraj subjektivaj konvinkoj, kiuj en tiu internacia vivo apenaŭ ludas gravan rolon.

La Strategia Laborplano abrupte finiĝas per ia cetera direktivo, kiun oni povus menciigi ankaŭ pli supre. Komplete mankas konkludo, resumo, postparolo, epilogo, fino.

Alvokoj kiel „Nia ĉefa tasko por la jardeko estas levi la profilon de Esperanto kiel aparte taŭga ilo por krei kaj konstantigi tian prilingvan konscion kun interkomunuma dimensio“ restos do nur malplenaj frazaĵoj, kiuj perdas ĉian sencon kaj per kiuj oni neniel kapablos levi la profilon de Esperanto. Male: En la venonta jardeko rapide forpasos multaj veteranoj pro la atingo de la aĝlimo, kio signifas, ke oni devos enkalkuli drastan ŝrumpo de la membraro. Estas la tasko de sociologoj kaj historiistoj kalkuli kiam tiu peripetio reale okazos. Anstataŭado kaj refreŝado de tiuj membraroj ne estas antaŭvideblaj.

Kie do estas niaj plej saĝaj kaj inteligentaj mensuloj, kiuj povus malrekomendi la akcepton de ĉi tia diletanta Strategia Laborplano, kiu en si mem reprezentas nuran embarasan pseŭdointelektan fikcion? Kial ili ne evitas tiun varman aeron, haltigas tiun ŝaumbatadon, kiu nur ridindigas la Esperanto-movadon? La sendiskuta akcepto mem de tiu Strategia Laborplano ja ankaŭ signalas kaj signifas, ke neniuj plu en la Komitato de UEA kaj entute en UEA havas la kapablon kaj kuraĝan kontraŭstari tiajn fuŝnaskitajn projektojn kaj ke neniuj interesiĝas pri taŭge verkita Strategia Laborplano. La plej nova fuŝa majstroverko de Probal Dasgupta probable lasos eĉ la komitaton kaj membraron de UEA indifera, kiu verŝajne jam delonge perdis la iluziojn pri la fina venko de Esperanto, eĉ se en enketoj ili konfesas la inversan opinion. Gravas postlasi iujn personajn spurojn en la movado por esti admirata, laŭdata kaj aplaŭdata de ĉiuj flankoj.

Riproĉinde al Dasgupta ne estas, ke li provis krei novtipan Strategian Laborplanon, kiu videble distanciĝas de la rigida skemo „informado, instruado, utiligado“ el la tempo de Lapenna. Kvankam tiuj nocioj restis konservataj dise ankaŭ tra la nova Strategia Laborplano, riproĉinde al Dasgupta estas, ke li detruis ĝian antaŭan koheran strukturitan koncepton kaj parte ellasis ideojn, kiuj daŭre validas, farante malbonan kopion de la antaŭa Strategia Laborplano, ĉerpante nur elementojn, kiuj konvenis al li kaj eliminante erojn, kiuj evidente ne plaĉis al li. Ĉi tio estas nek komprenebla, nek akceptebla kaj pruvas, ke Dasgupta verŝajne malmulte komprenis pri la idearo fiksata kaj perata de la antaŭa Strategia Laborplano, kiu en si mem estis taŭge verkita. La rekomendo daŭre utiligi tiun malnovan laborplanon kaj adapti ĝin nur per la plej necesaj aktualizaĵoj, bedaŭrinde estis ignorita.

Alia demando estas, ĉu la celaro de la antaŭa Strategia Laborplano estis atingita? Ĉu la antaŭvidita analizo estis farita – ekzemple pri la „nova kampanjo ‚Al lingva demokratio‘, pri la „profesiigo“, „plijuniigo“, „tutmondiigo“ kaj „malfermiigo“ de la Esperanto-movado, kiu laŭte estis anoncita en la antaŭa Strategia Plano? Kiuj rezultoj el tiuj kampanjoj estis videblaj? Necesus tralegi ĉiujn ĉi-koncernajn

raportojn publikigitajn en Estraraj Raportoj kaj en la revuo *Esperanto*. Ĉu la Komitato estis „informita pri la progreso de la laboro minimume ĉiun trian monaton“ ? Ĉu la Komitato „pritaksis la atingojn de la plano“ ?

La plej gravaj frazoj en la antaŭa Strategia Laborplano estis inter alie: „Esperanto estos rigardata kiel vera lingvo, kiam ĝi estos utila ankaŭ por atingi ĉiuspecajn celojn de la homa vivo“ kaj „La Esperanto-movado ne devas resti fermita klubo, sed rimarkebla parto de la normala vivo de la ĉirkaŭa socio“. Tiuj nekontesteblaj kaj nerenverseblaj veroj simple mankas kiel filozofia platformo en la nova Strategia Laborplano. Tiajn simplajn verojn necesus rekonscii al la homoj. La sama principo validas por la punkto „Demokratiigo de la vivo de UEA kun pli da respekto por ĉiuj agantoj je ĉiu nivelo.“ De ĉi tiu demokratiigo en UEA, kie malgranda koteria grupo de personoj ĉion decidas, estas nuntempe tre malmulte sentebla.

Por estontaj Strategiaj Laborplanoj ni rekomendas la skemon laŭ la agadkampoj de la estraranoj de UEA: Ĝenerala planado, Kulturo, Kongresoj, Edukado, Informado, Financoj, Eksteraj Rilatoj, Landa kaj Regiona Agado, Faka kaj Scienca Agado, Aktivula Trejnado, Junularo, ktp.

Rimarkinde estas ankaŭ, ke la interesiĝo pri la dokumentaro de UEA ŝajnas esti tre magra inter la membraro. En la du semajnoj post ĝia publikigo sur reto.uea.org ne pli ol inter 3-10 uzantoj elŝutis la Strategian Laborplanon, la spezkalkulon, la Tagordon de la komitataj kunsidoj, k.c.

Redakcio de *Spegulo*